Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-01 sendita el Budapeŝto, la 14an de januaro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# AMO preter 40 -- ĉu viv-eko aŭ viv-kulmino?

Populara diraĵo tekstas: "La vivo komenciĝas je kvardek." Oni povas diskuti transgeneracie tiun tezon, sed tio ŝajne ne validas por la AMO-programo de UEA. Ĝi naskiĝis kaj rapide kreskis tra la infanaĝo en 2014, en 2015 ĝi trairis la adoleksan fazon, en 2016 ĝi atingis plenkreskon. En 2017, kun 12 seminarioj en 11 landoj ĝi jam atingis tiun proverban mezaĝon. El tiuj 11 landoj, 5 estis por AMO novaj: Barato (Hinda Unio), Kartvelio, Korea Respubliko, Rusio kaj Svislando. Pri AMO en 2017 vidu la revuon *Esperanto*, januaro 2018, p. 6 kaj 7. Tri seminarioj traktis edukajn temojn (33 en Greziljono, 35 en Les Brenets kaj 38 en Busano).

En 2018 la programo impetas antaŭen al sia kvindeko:

**AMO 42** en Novjorko (sabaton la 27-an de januaro 2018) pri la rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj.

**AMO 43** en Havano (meze de februaro) kadre de la 9a Tut-Amerika Kongreso (TAKE).

**AMO 44** en Moskvo (en februaro 20-21) tuj antaŭ APERO-12.

**AMO 45** ĵus anoncita, en Marakeŝo, Maroko (iam inter aprilo 1-3), kadre de la 11a Mezorienta Kunveno.

Pendas petoj el Burundo, Benino kaj Slovakio – kadre de KAEST 2018 novembre. Ekcirkulas scivolo – kie okazos la 50a AMO?

# La temaro de AMO 42 – unuafoje pri niaj eksteraj rilatoj

"Kiel efike reprezenti niajn organizojn? Kiel taŭge interrilati kun ekstermovadaj instancoj, je loka, landa, internacia nivelo? Kiel konstrui por niaj organizoj bildon de fidindaj kaj prestiĝaj partneroj? Kaj kial? Se vi interesiĝas pri tiuj ĉi demandoj, partoprenu en la 42-a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO), okazonta en Novjorko, fronte de la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, sabaton la 27-an de januaro 2018.



La foto: En la Novjorka oficejo; foto el 2010

Aktivuloj de UEA kaj TEJO rakontos al vi siajn spertojn, donos konsilojn, aktivigos vin per praktikaj ekzercoj, tiel ke la konoj ne restu je teoria nivelo. Estos taŭgaj okazoj dum la tuj sekvaj tagoj por jam praktike apliki la akiritajn konojn: preparkunsidoj pri la Junulara Forumo de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (EKOSOK), la Forumo mem (30-an kaj 31-an de januaro 2018) kaj flankaj eventoj kadre de ĝi, kie TEJO havas tre aktivan rolon.

Onidire la numero 42 reprezentas la finan respondon pri la signifo de la vivo kaj de la universo; ni ne havas tian ambicion, sed ni celas plialtigi vian konscion pri la temo. Grava antaŭaverto: dum kaj post la seminario povos estiĝi novaj demandoj. :-)"

Alvokis: Sara Spanò, la estrarano pri Aktivula Maturigo.

## Freŝa novaĵo: AMO 45 okazos en Maroko

Tiu seminario okazos kadre de la 11-a Mezorienta Esperanto-Kunveno (MEK) en Marakeŝo, Maroko. Ĝia temo estos: "Fortigi la E-movadon tra la Magrebo". La MEK mem okazos de la la 30-a de marto 2018 ĝis la 6-a de aprilo 2018, inkluzive de postkunvenaj ekskursoj el Marakeŝo. La temo de la 11a MEK estas: "Esperanto en Norda Afriko". La AMO-programo formos integran parton de la programaro de la 11a MEK, do aparta aliĝo ne necesas.



Oni aliĝas al la 11a MEK per simpla mesaĝo al <renato.corsetti@gmail.com>, en kiu oni skribas bazajn informojn laŭ la modelo prezentita ĉi-sube. La aliĝkotizo estas 20 eŭroj, pagendaj al la konto 'arabio' ĉe UEA kun la indiko 'Mezorienta Kunveno'. Pag-informoj al UEA legeblas ĉe: http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html . Se estas problemoj pri la pago al UEA oni povas interkonsenti pri pagado surloke. Bonvolu tiam antaŭinformi: ĉe:

<mezorienta.kunveno@esperanto.org> .

Modelo de aliĝmesaĝo: Familia Nomo, Persona Nomo, Adreso, Ret-adreso, Deklaro: Mi intencas partopreni la 11-an Mezorientan Kunvenon, Mi alvenos al Marakeŝo (se vi jam scias la daton), Mi bezonas helpon en Marakeŝo: jes [ ] ne [ ], Ĉu vi principe interesiĝas pri la postkunvenaj ekskursaj tagoj jes [ ] ne [ ]. Ekzistas propono por bonpreza kaj bonkvalita loĝigo.

Jam aliĝis (jan 13) 34 personoj, el Alĝerio, Belgio, Britio, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Hungario, Latvio, Maroko, Nederlando, Pollando, Rumanio, Senegalo, Serbio, Svislando kaj Tunizio – do ege internacia estos la aranĝo.

Vidu informojn ĉe:

https://uea.org/vikio/La_dekunua_Mezorienta_Kunveno_en_Marakesho,_Maroko

Aliĝoj kaj informoj ĉe: <mezorienta.kunveno@esperanto.org**>**

Rigardindas ankaŭ la paĝaro de nia regiono MONA: [https://monainformado.wordpress.com](https://monainformado.wordpress.com)




Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <[https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/)>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

EKO 2018-01 AMO 42-45 kaj MONA.doc

Aldonaĵo: La ĵus alveninta novaĵletero de la Novjorka Oficejo de UEA, kiu kunlaboros pri AMO 42.